Sarah Fischer

Sarah Eugenie Fischer (23-an de februaro 1896 - 3-an de majo 1975) france-naskita kanadana sopranulino, arta administristo, kaj muzika edukisto. Naskita de polaj judaj gepatroj en Parizo, ŝi elmigris kune kun sia familio en Kanadon estante 12-jara. Ŝi estis unue trejnita en Montrealo

kiel kantistino, kaj poste en Londono kaj Romo. Kiel opera sopranulino ŝi debutis en Montrealo en 1918 kaj poste ŝi havis karieron plejparte en Eŭropo de 1919 ĝis 1940. Ŝi revenis en Kanadon en 1940 kaj emeritiĝis en 1942. Ŝi estis influa voĉinstruisto kaj koncerta estrino en Montrealo je sia malfrua vivo, koncertigante operajn seriojn de ***Sarah Fischer*** de 1941 ĝis ŝia morto en 1975.

Unuaj vivojaroj kaj kariero.

Ŝi estis la filino de ***Jacob Fischer*** kaj lia edzino ***Dora Fischer***. ***Sarah Eugenie Fischer*** naskiĝis en pola juda familio en Parizo la 23-an de februaro 1896. Ŝia familio elmigris en Kanadon kiam ***Sarah*** estis 12-jara. Ŝi translokiĝis kun ili en Montrealon. Ŝia patro estis ĉapelisto kaj ŝi laboris samtempe ŝin trejnante kiel muzikisto. Instruon de kantado ŝi ricevis de ***Joseph-Jean Goulet*** kaj ***Céline Marier***. Ŝi ankaŭ studis aktoradon kun mezosopranulino ***Jeanne Maubourg***. Ŝi gajnis diplomon aldonitan de ***Académie de musique du Québec*** en 1917.

Fischer opere debutis en 1918 ludante la rolon de ***Micaëla*** (en la opero: ***Carmen de Georges Bizet***), kune kun ***Cédia Brault*** kaj ***Albert Roberval*** kiel direktisto, en la teatro: ***Monument-National***. Ŝi sekve partoprenis en aliaj operoj (komponitaj de ***Ambroise Thomas***, ***André Messager*** kaj ***Léo Delibes***) en Montrealo kaj Kebekurbo.

Studoj en Eŭropo kaj internacia kariero

De 1919 ĝis 1922 ***Fischer*** studis kantadon kun ***Cecilia M. Hutchinson*** ĉe ***Royal College of Music (RCM)*** en Londono. Ŝi ĉeestis lerneje post ŝia ricevo de oportuno por instruiteco de la universitato ***Conservatory of***

Music at McGill en 1917, samtempe gajninte la medalon: ***Sol feggio*** tiujare. La 1-a mondmilito preventis la foriron de Kanado en Brition al ŝi ĝis du jaroj poste. Laŭ ĵurnalisto kaj aŭtoro ***Debbie Marshall***, ***Fischer*** estis supozeble lesbanino kaj judino, kaj tial probable ŝi alfrontis defiojn dum periodo kiam kontraŭsamseksemo kaj antisemitismo estis la normo. La ĵurnalistino ***Elizabeth Montizambert***, kiu amikiĝis kun pluraj virinoj, kiuj laŭdire estis lesbaninoj, donis al la kariero de ***Fischer*** asiston per la enkonduko de eminentuloj venantaj el Brita societo, inter ili estis ***Arthur Balfour***. Ŝi ricevis plu voĉan trejnon de ***Emma Albani***, kiu intime amikiĝis kun la sopranulino dum ŝia restado en Anglio.

Studante ĉe la ***RCM***, ŝi daŭrigis sian rolon kiel koncerta sopranulino, kaj en 1920 ŝi rolis kiel ***Countess Almaviva*** en ***La edziĝo de Figaro*** ĉe ***The Old Vic*** kune kun ***Sumner Austin***. Ŝi revenis al ***The Old Vic*** en 1921 ludante la rolon de ***Micaëla***. En majo 1921 ŝi havis sian unuan recitalon en Britio ĉe ***Wigmore Hall***. Ĝi estis la unua el multe da recitaloj, en kiuj ŝi rolis ĉe tiu teatrejo dum ŝia kariero.

Fischer estis la **prima donna** ĉe la ***Royal Opera House (ROH)*** en 1922 kaj 1923, ludante rolojn de: ***Countess Almaviva***, ***Eva*** en ***Die Meistersinger von Nürnberg***, ***Marguerite*** en ***Faust***, kaj ***Pamina*** en La magia Fluto. Rimarkindas ŝian kantadon por la unua radia elsendo la 8-an de januaro 1923. Poste, ŝi daŭrigis studojn en Romo kun ***Vincenzo Lombardi*** antaŭ sia reveno al ROH en 1925. Ŝi estis rolulo nur alifoje en opero ĉe la ***ROH*** en 1936.

En 1925, la ***Opera Comique*** en Parizo gastigis ŝin, kie ŝi gajnis renomon per sia rolo de ***Mélisande el Pelléas*** kaj ***Mélisande*** de ***Claude Debussy***. En 1927 ŝi revenis al ***Opera Comique***. Samjare ŝi estis rolulo en recitalo ĉe ***Opera Comique*** en Montrealo, sekve ankaŭ en Toronto, Otavo, Kebeko. Ankaŭ ŝi prezentis recitalon en Novjorko kun ***Giuseppe Bamboschek***, kiu sekve estis la dirigento ĉe la ***Metropolitan Opera***, en Novjorko.

En 1928 ŝi rolis ĉe la ***Théâtre des Champs-Élysées***, ĉi tiu evento estis parto de la internacia festivalo dediĉita al Mozarto. Samjare, ŝi prenis la okupon kiel soloisto en la unua kompleta prezento kondukita de ***Bruno Walter***. En julio 1928 ŝi kunlaboris koncerte kun la ***London Chamber Orchestra***, kiu estis elsendita per radio.

En 1927, 1930, kaj 1936 Fischer koncerte rolis en Montrealo. Ŝi recitale rolis ĉe ***Wigmore Hall*** en Londono (1928) kaj ĉe ***Salle Gaveau*** en Parizo (1929) kunlaborante kun pianisto: ***Herbert Carrick***. ***Carrick*** kaj ***Fischer*** estis geedzoj, geedziĝinte en Parizo la 21-an de decembro 1928.

La 6-an de julio 1934, ***Fischer*** aperis en la unua televida elsendo de la ***BBC***. Ŝi restis aktive kiel koncerta kantisto en Eŭropo ĝis sia reveno en Montrealon en 1940, decido farita parte pro la starto de la dua mondmilito, kaj parte pro la malsaniĝo de ŝia patro.

Fischer emeritiĝis en 1942 post adiaŭa koncerto en Montrealo. Ŝi forpasis 79-jara ĉe la hospitalo ***Hôtel-Dieu*** en Montrealo la 3-an de majo 1975.

This is a translated and slightly adapted version of the Wikipedia article Sarah Fischer (soprano). It is not a word-for-word translation.
This work is based on Wikipedia content and is available under the Creative Commons Attribution-ShareAlike License (CC BY-SA) and photos provided under the license CC BY 2.0. (link: https://creativecommons.org/licenses/by/2.0/) Created by BiblioArchives / LibraryArchives.